# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ huhtikuu ◆ aprilo ◆ 2/2015




## Memoroj kaj impresoj pri la Vintraj Tagoj en Tampereo, p. 14

◆ Redaktoro Kniivilä en Krimeo, p. 11

◆ Syyspäivät Lahdessa, s. 6 ◆ Kesäkurssi Turussa, s. 8

# ESPERANTOLEHTI

**Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet** ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 💻 *eafgazeto@esperanto.fi*
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori 💻 *robog@gmx.de*
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* 💻 *maj-lis@maisanpaja.info*
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 24 EUR/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 2642 742 💻 *eaf@esperanto.fi*
**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
**Pankkitili/Bankkonto:** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
**Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto:** 300
**Kansi/Pärm/Kovrile:** Kansi/Pärm/Kovrile: Lekanteto, Foto: RB

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 💻 *eafprezidanto@esperanto.fi*
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 *paivi.saarinen@iki.fi*
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709, (02) 230 5319 💻 *eafsekretario@esperanto.fi*

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**
*Robert Bogenschneider*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 💻 *robog@gmx.de*
*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 💻 *tiina.kosunen945@gmail.com*
*Arja Kuhanen*, Saratie 2, 31300 Tammela. 💻 *arja.kuhanen@netti.fi*
*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 💻 *paula.niinikorpi@gmail.com*

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Tapani Aarne*, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 💻 *tapani.aarne@mbnet.fi*
*Börje Eriksson*, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 💻 *esperarto@phnet.fi*
*Tuomas Latva-Pirilä*, Ratakatu 6 as. 12, 96100 Rovaniemi. ☎ 0400 702 816 💻 *tuomas.latva-pirila@suomi24.fi*

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 💻 *eafkasisto@esperanto.fi*
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo 💻 *eaf@esperanto.fi*

**Internet**: *www.esperanto.fi* ◆ *www.facebook.com/Finnlando* ◆ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando



# Yhteiskielisyyden monet näkökohdat

Saimme Tampereen talvipäivillä (katso sivua 14) kuulla professori Arto Mustajoen mielenkiintoisen luennon yhteiskieliaiheesta: ”Lingua francat” yleisenä ilmiönä. Esperantistinäkökulmasta on tietenkin vain yksi ”oikea” yhteiskieli, eikä se ole mikään kansallisista kielistä. Yleisestä näkökulmasta on toisin, yhteiskielen aseman ottaa se, joka on vaihtoehtona mahdollisin. Mikä on mahdollista, siinä määräävänä tekijänä on kielen käyttäjien lukumäärä ja levinneisyys, mutta myös heidän valtakoneistoissa pitämänsä asema.

Mustajoki on tunnetuin slavistina, ja hänen pakinoivista pikkuesseistä koostuvaa teostaan *Kevyt kosketus venäjän kieleen* voi suositella kaikille kielestä ja kommunikaatiosta kiinnostuneille; se ei ole venäjän oppikirja eikä edellytä mitään ennakkotietoja, vaan tarkastelee maallikontajuisesti kielten kehitystä, muutosta ja vaellusta, ennen muuta meidän ja itänaapuriemme, mutta myös yleisemmin. Luvusta *Venäjän kieli maailmalla* selviää, että venäjä sekä levinneisyytensä että entisen suurvaltakielen asemansa ansiosta on edelleen maailmalla hyvin paljon käytetty ”linguafranca”: kun vaikkapa ukrainalainen ja uzbekki kohtaavat maailmalla, heillä on siinä hyvin osattu yhteiskieli. Ja tällaista diasporaa on paljon; Britanniassa ja Irlannissa englanti on itäsiirtolaisille paikallinen ja vieras, kun taas venäjä saattaa olla samassa asemassa kuin englanti varsin laajasti muuten maailmalla.

Englannin asemasta on samassa luvussa kiinnostava havainto. Siinä missä venäjän opiskelu on Neuvostoliiton hajoamisen jälkeen maailmalla romahtanut, on englanti levinnyt entisestään ja sen lingua franca -asema on vahvistunut entisestään. Koskaan aikaisemmin minkään kielen käyttö ei ole laajentunut yhtä nopeasti. Lasketaan, että englantia vieraana kielenä paremmin tai huonommin osaavien määrä on jo moninkertainen äidinkielisiin verrattuna. Se on aiheuttanut ilmiön, jota voisi kutsua kielen sopeutumiseksi yhä isommille joukoille: kielioppi murenee, virheitä (tai ”virheitä”) siedetään enemmän. Sillä tavalla kieli muuttuu, tapahtuu yhtaikaa sekä hajoamista että yhtenäistymistä. Tosiasia on, että englanti on levinnein ja käytännöllisin apukieli.

Mustajoki mainitsee myös äidinkielisten englanninpuhujien keskuudessa esiintyvän vastailmiön. Kielen ylivaltaa ei pidetä pelkästään hyvänä asiana, vaan myös ongelmana kahdesta syystä, joista toinen on esperantistinäkökulmasta sangen kiinnostava. Ensinnäkin kaikkialta maailmalta tulviva ”epäenglanti” ärsyttää samaan tapaan kuin ”hoono soomi” meillä (vaikka ainakin meidän pitäisi erityisesti arvostaa ulkomaalaisten ja uussuomalaisten lingua franca -suomea). Toiseksi, ja tämä on merkittävää, englanninkielisissä maissa tiedostetaan ongelmaksi se, että vieraiden kielten osaaminen on niissä kovin vähäistä: kaikkialla muualla ollaan vähintään kahden kielen, oman ja englannin, taitajia ja siten vähintään kahden, usein useamman kulttuuripiirin kotolaisia, kun taas Britan-

▶▶

niassa, Yhdysvalloissa tai Australiassa ollaan ikään kuin ulkona omassa saaressa. Sellainen ympäristö ei kasvata toisten kulttuurien tuntijoita. – Tähän voisi lisätä vielä, että englannin kieli ei suinkaan ole yhtenäinen kotikentilläänkään. Murre-erot, paikalliset ja varsinkin sosiaaliset, ovat suuria.

Venäjän ja englannin aseman muutosten vertailu lingua francana on kiinnostava etenkin syittensä vuoksi. Olisiko tulossa jonkinlainen kielellinen ”historian loppu”? Yhdysvaltalainen Francis Fukuyama keksi tuon ilmaisun ennustaessaan vuonna 1992 ideologioiden häviämistä kylmän sodan päättymisen myötä. Niin ei ole käynyt, ja kielellisetkin ristiriidat ovat edelleen nationalististen ja muiden kiihkosuuntien käyttövoimana. Parasta yhteiskieliratkaisua etsitään edelleen, ja me ehdotamme sitä. Zamenhofin ihanteille on edelleen tilausta.

*Tuomo Grundström*

# Reklamo pri nia stoko de trezoroj

Menso nia estu ema, cerboj niaj certe celu
re-trastudi tradicion, re-ekpreni belan libron,
kiun Lönnrot forte forĝis, kaj tradukis Leppäkoski
por konservi konon praan, por pluporti daŭran scion.

Runojn rulis Karelio, vagis versoj tra Finnlando
de la bord' de Blanka Maro ĝis Botnio okcidenta,
de Baltmaro en la sudo ĝis la norda Laponio;
de patrino al filino, de ŝamano al lernanto.

Kreskis klero en la lando. Tiu vartis siajn filojn,
kiuj iris skribon lerni por konstrui la nacion:
por kolekti kaj konservi vortojn por popol' komunajn,
por kulturon kune krei, por pluporti poemtorĉon.
Tion faris Agricola, poste Petro-episkopo,
Danielo Juslenio, Porthan, Gottlund kaj Ganander.
Lönnrot fine kompletigis kolektaĵon kiel tuton.

Kreskis ankaŭ eksterlande klerigantoj multeflanke,
kies cerbo certe celis disdividi dian arton
inter la popoloj juste, interkomprenigi ĝuste.

La ideo esperanta trafis en Finnland' junulon
Johan Edvard Leppäkoski, kiu prenis sur sin taskon
peri finnan poezion, la popolan kaj modernan.
Versoj el la plumo fluis, vortoj sur paperon svarmis,
ritmoj inter frazoj rajdis, melodioj moduliĝis.

Estis kulturag' giganta, Kalevala Esperanta
preta jam antaŭmilite, bombardbrule ekstermite
en Viborgo. Reverkite pres-aperis en sesdekaj.
Tiam vendiĝinta bone, en okdekaj re-eldone;
kuŝas plu l' eldon' grandkvanta, la vendado estas
lanta.

Vi daŭrigu l' kulturagon! Mendu jam ĉi tiun tagon
du aŭ tri Kalevalaojn por donaci al amikoj!

*– tg*

**Prezo de unu ekzemplero 10 € + sendokosto**
(numerita eldono 67 €; luksa tola bindaĵo kaj ora flanko 100 €)

Mendu ĉe EAF:
Oficeja adreso aŭ rete *eafmendoj@esperanto.fi*

# Esperanta Finnlando por 2015!
# Esperantolehti vuodelle 2015!

Memoru renovigi vian mendon de nia enlanda gazeto Esperanta Finnlando. Eblas mendi tra via membroasocio same kiel lastjare. La jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando 7.3.2015 en Tampere konfirmis la membrokotizojn de la individuaj membroj kaj de la subtena asocio Societo Nino Runeberg.

**Se vi estas individua membro de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF):**
- Esperantolehti/Esperantobladet/Esperanta Finnlando estas inkluzivita en la membrokotizo, (22 eŭroj).
- Tiuj, kiuj estis membroj lastjare, ricevos de la kasisto leteron kun pagilo kaj referencnumero.
- Nova membro: informu vian nomon kaj adreson al EAF (kontaktinformoj en paĝo 2).
- La membrokotizo de la subtena asocio Societo Nino Runeberg estas daŭre 44 eŭroj. La estraro antaŭdankas pro via helpo.

**Se vi estas membro de iu membroasocio de EAF (rigardu la liston en la antaŭlasta paĝo):**
- Esperantolehti kostas por vi 16 eŭrojn.
- Pagu al via membroasocio kune kun la membrokotizo laŭ la instrukcioj de via asocio.

**Se vi deziras fari donacabonon aŭ mendi kromajn gazetojn por via uzo:**
- Esperantolehti kostas tiam 24 eŭrojn.
- Vi povas pagi aŭ al EAF aŭ tra via membroasocio.

NOTU, KE LA NUMERO 2/2015 ESTAS LA LASTA KIUN VI RICEVAS ĈI-JARE SEN REABONO.

**Dankon pro via reabono! Ĝuu la legadon!**

Muista jatkaa Esperantolehden tilausta vuonna 2015! Jos tilaat lehden jonkin jäsenyhdistyksen kautta, ilmoita siitä samalla kun maksat jäsenmaksun. Liiton vuosikokous 7.3.2015 vahvisti liiton henkilöjäsenen jäsenmaksuksi 22 euroa myös tänä vuonna.

**Suomen Esperantoliiton henkilöjäsen (individua membro):**
- Lehtimaksu sisältyy jäsenmaksuun (22 euroa).
- Viimevuotiset jäsenet saavat muistutuskirjeen ja viitenumeron liiton rahastonhoitajalta.
- Uusi jäsen: ilmoita osoitetietosi liittoon (yhteystiedot lehden sivulla 2).
- Liiton toimintaa voi tukea liittymällä Nino Runeberg –seuran jäseneksi (44 euroa).

**Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestön jäsen:**
- Lehtimaksu on 16 euroa.
- Jäsenjärjestöjen yhteystiedot ovat takakannen sisäsivulla.
- Maksa lehti omalle jäsenjärjestöllesi yhdessä jäsenmaksun kanssa. Hoida maksu yhdistyksesi ohjeiden mukaisesti eräpäivään mennessä.

**Lahjatilaukset ja lisälehdet:**
- Lahjatilauksena lehden vuosikerta maksaa 24 euroa. Lisälehdillä sama hinta.
- Voit maksaa lahja/lisätilauksen joko liittoon tai jäsenjärjestösi kautta.

HUOMAA, ETTÄ LEHTI NRO 2/2015 ON VIIMEINEN, JONKA LÄHETÄMME TÄNÄ VUONNA, JOS TILAUSTA EI OLE UUDISTETTU.

**Kiitos tilauksen uusimisesta! Hyviä lukuhetkiä!**

# Statistiko 2014: Denove pli ol 5 000 individuaj membroj

En la aprila numero de la revuo Esperanto aperis la oficiala statistiko pri la membraro de UEA en 2014. Laŭ ĝi estis entute 5 027 individuaj membroj, t.e. 124 pli multe ol en 2013. Plej multe da individuaj membroj pasintjare liveris Germanio (462), Brazilo (454), Francio (429), Japanio (326), Usono (269) kaj Nederlando (206).

La plej granda kresko okazis en Brazilo (+77), evidente dank' al la UK en la najbara Argentino, kie la kongresa efiko estis +27. El la modela varbado fare de la estraranoj *Lee Jungkee* kaj *Martin Schäffer* rezultis grava kresko respektive en Korea Respubliko (+60) kaj Meksiko (+39). Same okazis ankaŭ en Ĉinio (+36), kie Trezoro (*Huang Yinbao*) ekfunkciis kiel nova energia kotizperanto. Menciindan falon, kvankam nur incidentan pro la fora UK, notis Francio (-40), Rusio (-24) kaj Pollando (-19).

La aligitaj membroj – t.e. tiuj membroj de la landaj asocioj, kiuj ne estis samtempe individuaj membroj de UEA – nombris 9 789 (-230). Sekve la tuta membraro de UEA, kiu konsistas el la individuaj kaj aligitaj membroj kune, estis 14 816 (-106).

449 individuaj membroj de UEA estis samtempe individuaj membroj de ĝia junulara sekcio TEJO. Tio estas 119 pli ol en 2014, tiel ke la kresko de la nombro de individuaj membroj de UEA okazis preskaŭ tute pro la plimultiĝo de junaj membroj. La nombro de junaj aligitaj membroj estis 1 477 (-183). La tuta membraro de TEJO do iom ŝrumpis kaj estis 1 926 (-64).

La revuo ”Esperanto” havis 2 898 pagitajn abonojn (-70) kaj la junulara revuo ”Kontakto” 690 (+89).

*el GK 574*

# Aŭtunaj Tagoj en Lahti – Syyspäivät Lahdessa 12.–13.9.2015

La venontan fojon la Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos en *Lahti*. La kunvenejoj estas en la centro de la urbo, ĉar ni uzos la koncertsalonon de la Muzikinstituto de Lahti kaj tranoktos en la apuda hotelo *Kauppahotelli Grand Lahti*. En la programo estos i.a. koncerto de la kantelisto *Timo Väänänen* kaj vizito al la *Sibeliusdomo* en la bela haveno de la urbo. Pliaj informoj venos en la sekvaj numeroj kaj en niaj retpaĝoj, sed notu jam la datojn.

*Suomen Esperantoliiton seuraavat syyspäivät ovat Lahdessa. Tapaamispaikkamme ovat kaupungin keskustassa Lahden musiikkiopiston konserttisalissa sekä Kauppahotelli Grand Lahdessa. Ohjelmassa on mm. kanneltaja Timo Väänäsen konsertti sekä vierailu Sibelius-taloon, joka sijaitsee Lahden kauniilla satama-alueella. Lisätietoja lehden seuraavissa numeroissa sekä nettisivuilla, mutta merkitse päivämäärät jo kalenteriisi.*



**Timo Väänänen, fotis Ilari Ikävalko (Ilari), Wikimedia Commons**

Bonvenon aŭtune en Lahti!
*Tervetuloa syksyllä Lahteen!*

*Estraro de EAF*

# Malagrabla vizito en la oficejo

Sabaton 21.2. Tuomo Grundström estis en Helsinki kaj decidis mallonge viziti la oficejon ĉe Siltasaarenkatu. Enirante li vidis paperojn kaj aĵojn surplanke. La malgranda fenestro en la ĉefa ĉambro estis malferma kaj videblis ke nebonvenaj vizitantoj estis entrudintaj la oficejon.

Tuomo alvokis la policon, sed devis foriri. *Päivi* kaj *Antti* venis kaj poste ankaŭ la policistoj, kiuj atente traserĉis la ĉambrojn pri spuroj. Ili trovis diversajn signojn, i.a. injekciilojn kaj cigaredstumpojn. La entrudintoj iel estis povintaj eniri tra la fenestro de la ĉefa ĉambro sed juĝite de la postlasaĵoj ili estis simplaj droguloj, en tre konfuzita stato. La polica esploro finiĝis sen doni informojn pri la identeco de la entrudintoj sed restas en la arkivoj kaze ke ili iam faros alian krimon.

Feliĉe la vidaĵo enirante estis pli ŝoka ol la vera stato de aferoj. Ja regis misordo, kelkaj aĵoj estis rompitaj kaj paperoj malpurigitaj, sed la fenestroj ne estis rompitaj nek ekzemple la kontanta kaso estis ŝtelita. La nuraj perdoj estis la oficeja telefono kaj unu serio de ŝlosiloj. La ŝlosiloj tamen kauzis iom da kostoj ĉar la sekureca seruro estis ŝanĝita.



Por kelka tempo la oficejo estis malfermita kaj la telefonnumero ne respondis, sed dank' al *Salla Lappalainen* kaj *Ritva Sabelli*, kiuj brave helpis en purigado, la oficejo nun funkcias relative normale. La telefono estas anstataŭita kaj la antaŭa numero uzata, ankaŭ la mardaj malfermhoroj estas restarigitaj. Ioma reordigo ankoraŭ necesas, sed EAF kaj EKH bonvenigas ĉiujn viziti la oficejon marde je 17–19.

## Eventokalendaro – Tulevia tapahtumia

**2015**

* **14.–17.5.** Sveda Kongreso en *Upsala* kun AMO-seminario
* **4.–7.6.** Somera kurso de EAF en *Turku* – vidu *www.esperanto.fi*
* 25.–28.6. Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-51) en *Tallinn*, Estonio – *www.esperanto.lt/board/view.php?id=arangxoj&no=81*
* **11.–19.7.** 10-a SES (Somera E-Studsemajno de lernu.net) en *Martin*, Slovakio – *ses.ikso.net*
* **25.7.–1.8.** 100-a UK (Universala Kongreso) en *Lille*, Francio – karavano el Finnlando
* **2.–9.8.** 71-a IJK (Internacia Junulara Kongreso) en *Wiesbaden*, Germanio
* **22.–29.8.** 82-a Itala Kongreso de Esperanto en *San Benedetto del Tronto* (Adria maro) – *kongreso.esperanto.it/82/?lang=eo*
* **12.–13.9.** Aŭtunaj Tagoj de EAF en *Lahti*

# Esperanton kesäkurssi Turussa – Somera kurso en Turku 4.–7.6.2015

**Kursejo, *kurssipaikka*: Auralan kansalaisopisto, Civitana Instituto de Aurala, adreso, *osoite*: Satakunnankatu 10, 20100 Turku**

**www.esperanto.fi – www.aurala.fi**

Jam venis aliĝoj al la somera kurso en Turku. Ĉu vi estas inter ili? Nia kursoteamo, Patrik Austin kun edzino Alia kaj la kursorespondeculo Tiina Oittinen jam entuziasme atendas vin. Ĉiutage ni havos instruadon dum 5–6 horoj. Tiuj, kiuj ne ankoraŭ konas la lingvon komencos de la unuaj aferoj. Aliaj profundigos sian lingvoscion pere de la daŭriga kurso, kiam spertuloj povas helpi la novulojn. Dum la libertempo ni konatiĝos kun la vidindaĵoj de la urbo kun esperantlingvaj ĉiĉeronoj. Vidu la tagan programon. Bonvenon!

*Oletko jo kesäkurssille ilmoittautuneiden joukossa? Kurssitiimimme Patrik, hänen vaimonsa Alia ja kurssivastaava Tiina odottavat jo teitä kaikkia. Kurssilla on opetusta on päivittäin 5–6 tuntia. Kurssi räätälöidään osallistujien mukaan ja opetuskieli on pääasiassa esperanto. Mukaan voi siis tulla, vaikka et tietäisi vielä mitään esperantosta. Jonkin verran kieltä jo osaavat saavat lisäharjoitusta ja enemmän taitavat erityistehtäviä. Vapaa-aikana tutustumme Turun kaupunkiin Turun Esperanto-yhdistyksen esperantonkielisten oppaiden johdolla. Tutustu päivittäiseen ohjelmaan. Tervetuloa!*

### Aliĝo kaj kotizoj

Aliĝu al Aurala tra *www.aurala.fi* aŭ tra la kursorespondeculo de EAF, Tiina Oittinen (*eafsekretario@esperanto.fi*, tel. +358-50-5494709). Sciigu pri via partopreno kaj alveno al Tiina.

**Kursokotizoj:** 90 EUR (tuta kurso), 50 EUR (2 tagoj), 30 EUR (1 tago). La kotizon oni pagas al la kursorespondeculo kontante surloke. Ĝi enhavas la materialon de la instruisto kaj kafon en la kursejo ĉiutage. Aliajn manĝojn kaj muzeajn vizitojn ĉiu pagos mem same kiel tranoktadon. Pri tranoktado vidu oferton de s/s Borea.

### Ilmoittautuminen ja kurssimaksut

Ilmoittautuminen Auralaan nettisivujen kautta, *www.aurala.fi.* Kurssivastaava Tiina Oittinen auttaa tarvittaessa. Kerro Tiinalle osallistumisestasi ja saapumisaikasi (*eafsekretario@esperanto.fi*, puh. 050-5494709).

**Kurssimaksut:** 90 EUR (koko kurssi), 50 EUR (2 päivää), 30 EUR (1 päivä). Maksetaan käteisellä kurssin alussa kurssivastaavalle. Maksuun sisältyy opettajan materiaali sekä kahvi opistolla päivittäin. Muut ruokailut, museoiden pääsymaksuy ja muut kulut sekä majoituksen kukin hoitaa itse. Majoituksesta ks Laivahostel Borean tarjous.

### Tranoktado en Turku

La junulara gastejo de la urbo nuntempe situas surŝipe s/s Borea en la haveno. Ni ricevis jenan oferton de la hostelo: 2-lita ĉambro 32,00 EUR/persono/nokto, 1-lita same 42 EUR. Pliajn sciojn finne sube, demandu de Tiina, se vi bezonas helpon.

### Yöpyminen Turussa

Kaupungin nuorisomaja eli hostelli on nykyään satamassa sijaitseva *Laivahostel Borea*. Se on ainutlaatuinen hostelli, joka toimii museoidussa Bore-laivassa Aurajoessa, Forum Marinumin pihapiirissä, aivan Turun linnan ja Turun sataman naapurissa. Turun keskustaan kaup-



Patrik kaj Alia

patorille matkaa tulee noin 2,5 km (bussi nro 1). Samalla bussilla pääsee myös lähelle Auralan kansalaisopistoa. Saimme hostellista seuraavan tarjouksen: Esperanton kesäkurssille saapuville opiskelijoille on varattu majoituskiintiö **1 hh hintaan 42,00 e/hlö/vrk** ja **2 hh hintaan 32,00 e/hlö/vrk**. Kiintiöön kuuluu 10 kpl 2 hengen hyttiä ajalle 3.-7.6.2015. Hintaan sisältyy majoitus 1–2 h hyteissä, liinavaatteet itse pedattuina, pyyhe, aamusauna ja aamupala laivan ravintola Kristinassa. Maksuton pysäköinti Forum Marinumin piha-alueella. Varaukset sähköpostilla osoitteeseen *hostelborea@turku.fi* tai *040-843 6611*. *Varauskoodi Esperanto* ilmoitettava varauksen yhteydessä. Majoitus maksetaan saavuttaessa käteisellä tai kortilla. Kiintiö purkautuu 10.5.2015, jonka jälkeen hytit palautuvat hostellin vapaaseen myyntiin.

### Taga programo, päivittäinen ohjelma

(ŝanĝoj eblas, muutokset mahdollisia) *Merkredo, keskiviikko 3.6.2015*: Antaŭkursa ekskurso: kolektiĝo je la 17a ĉe la katedralo de Turku, kaj de tie piedirado al la proksima *Sibeliusmuzeo* por viziti la ekspozicion de la jubilea jaro de la fama komponisto. Vespermanĝo en taŭga loko. *Kurssia edeltävä retki: kokoontuminen klo 17 Turun tuomiokirkolla, josta kävellään läheiseen* Sibeliusmuseoon. *Museossa tutustutaan Sibeliuksen juhlavuoden näyttelyyn. Iltaruoka sopivassa paikassa.*

*Ĵaŭdo, torstai 4.6.2015*: 11.30 Malfermo de la kurso, la instruistoj kaj gelernantoj prezentas sin. *Kurssin avaus, opettajien ja opiskelijoiden esittäytyminen.* 12.00 Instruado (kun paŭzoj). *Opetusta (3 h)* 15.00 Kafopaŭzo kaj promenado en la ĉirkaŭaĵo. *Kahvitauko ja kävelykierros ympäristöön.* 16.00 Instruado (kun paŭzoj). *Opetusta (2 h)* 18.00 Vizito en la urba biblioteko kaj vespermanĝo en la apuda ĉina restoracio.*Vierailu Turun kaupunginkirjastoon ja iltaruoka viereisessä kiinalaisessa ravintolassa.*

*Vendredo, perjantai 5.6.2015* 9.00 Instruado (kun paŭzoj). *Opetusta (3 h)* 12.00 Lunĉopaŭzo, promenado al la proksima restoracio Logomo Kitchen. *Lounastauko, kävely lounaalle Logomo Kitchen -ravintolaan.* 14.00 Instruado (kun paŭzoj). *Opetusta (3 h).* 17.00 Promenado ambaŭflanke de la rivero Aura de la malnova urboplaco al Martinsilta-ponto. Vespermanĝo kaj vesperumo en restoracio Vaakahuone. *Kävely pitkin Aurajokivartta vanhalta suurtorilta Martinsillalle. Iltaruoka ja illanviettoa ravintola Vaakahuoneella.*

*Sabato, lauantai 6.6.2015* 9.00 Instruado (kun paŭzoj). *Opetusta (2,5 h).* 11.30 Kafo/lunĉopaŭzo, *Kahvi/lounastauko.* 12.30 Instruado (kun paŭzoj). *Opetusta (2,5 h).* 15.00 Veturo per buso al la kastelo de Turku, vizito en la kastelo. Vespermanĝo en taŭga loko. *Bussilla Turun linnaan, jossa kiertokäynti. Iltaruoka sopivassa paikassa.*

*Dimanĉo, sunnuntai 7.6.2015* 9.00 Instruado (kun paŭzoj). *Opetusta (2,5 h).* 11.30 Kafo/lunĉopaŭzo, *Kahvi/lounastauko.* 12.30 Instruado (kun paŭzoj). *Opetusta (2 h).* 14.30 Informoj kaj fermo de la kurso. *Tiedotteita ja kurssin päätös.* 15.00 Vizito al la metiista muzeo de Luostarinmäki. Poste manĝo en taŭga loko. *Käynti Luostarinmäen käsityöläismuseossa. Ruokailu sopivassa paikassa.*

# UEA serĉas novan Ĝeneralan Direktoron

Pro baldaŭa emeritiĝo de la nuna ofichavanto, kandidatoj estas serĉataj por la posteno de **Ĝenerala Direktoro de UEA** kun enkonduka spertiĝperiodo ekde la 1-a de januaro 2016.

La Ĝenerala Direktoro (ĜD) estas la ĉefa oficisto de UEA, kiu laŭ la Statuto respondecas al la Estraro pri la detala mastrumado kaj kontrolado de la aferoj de la Asocio. La ĜD kunlaboras kun la Estraro kaj aliaj ofichavantoj por realigi la mision kaj vizion de UEA, responde al la aspiroj kaj bezonoj de ĝia membraro, en la kadro de la Strategia Laborplano. Interalie la ĜD, kunlabore kun la Estraro, gvidas la movadan kaj ekstermovadan politikon de UEA, zorgas pri la financa evoluigo de la Asocio, kaj kreas sistemojn kaj etoson por efika kaj harmonia teama laboro en la Oficejo kaj la gvidorganoj.

Inter la nepraj kvalifikoj por tiu posteno estas baza universitata diplomo; tre bona skriba kaj parola Esperanto (KER C1), kun iu grado de klereco pri la historio kaj kulturo de Esperanto kaj pri UEA; almenaŭ skriba rego de la angla; kaj laŭeble bona rego de aliaj lingvoj. Kandidatoj devus havi plurjaran sperton en respondeca posteno en regiona, nacinivela aŭ internacia asocio aŭ firmao, kaj almenaŭ bazajn konojn pri oficeja mastrumado, planado kaj komunikado. Tre dezirindaj estas pruvitaj konoj kaj kapabloj pri: membro- kaj donacvarbado; gvidado de volontuloj; kunlaboro kun volontulaj teamoj kaj estraroj; interkultura komunikado; kaj la gvidado de internaciaj neregistaraj organizaĵoj. Aktiva organiza sperto en la movado estas dezirinda.

Plena priskribo de la respondecoj, dezirindaj kvalitoj kaj bezonataj kvalifikoj ĉe la posteno estas trovebla en la retejo de UEA ĉe *www.uea.org/pdf/postenpriskriboGhD.pdf*. Por kandidatiĝi, sendu leteron kaj kompletan vivresumon poŝte al la Centra Oficejo de UEA aŭ retpoŝte al *dungodir@co.uea.org* por alveni ĝis la 31-a de majo 2015. La plej kvalifikitaj kandidatoj estos invititaj al intervjuo kun estrara komisiono en Lillo, Francio, en la du tagoj antaŭ la komenco de la 100-a Universala Kongreso. Se necesas pliaj klarigoj pri la posteno, bv. kontakti retpoŝte la Prezidanton de UEA, d-ron *Mark Fettes*, *mtfettes@sfu.ca*.

*GK 571*

## Stipendi kesäkurssille – Stipendio havebla

ELFI (Suomen opettajien esperantoyhdistys ry) tarjoaa yhden 45 euron stipendin, joka on tarkoitettu Turun kurssille osallistuvalle alkajalle.

Anomukset osoitetaan 31.5.15 mennessä ELFI:n johtokunnalle ja lähetetään osoitteella *sylvia.h@kolumbus.fi*, tai *F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 TAMPERE*.

ELFI (Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj) ofertas unu stipendion je 45 €. Ĝi estas celita por komencanto, kiu partoprenos la someran kurson en Turku la 4.–7. de junio.

La peticion direktu ĝis la 31a de majo al la estraro de ELFI kaj sendu al *Sylvia Hämäläinen sylvia.h@kolumbus.fi, aŭ F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 TAMPERE*.

# Redaktoro Kniivilä en Krimeo

Antaŭ unu jaro (2014) redaktoro *Kalle Kniivilä* ricevis en Finnlando la prestiĝan literaturan Kanava-premion. La finna versio de la verko ”Homoj de Putin” gajnis la unuan premion en la konkurso de ne-fikciaj libroj. Recenzoj en finnaj kaj svedaj amaskomunikiloj estis favoraj kaj laŭdaj. Atenton vekis la fakto, ke la verkisto mem kreis kaj skribis la libron samtempe en tri lingvoj: en la sveda, finna kaj Esperanto.

En 2015 ripetiĝis simila fenomeno. Aperis ĉe la eldonejo Mondial en Nov-Jorko freŝa libroforma raporto sub la titolo ”Krimeo estas nia”. Plaĉis al mi legi kaj kompari la tekstojn de Kniivilä en tri etaj lingvoj. Lia plumo kuras flue kaj talente. Iam kaj tiam necesas dum avida legado halti kaj ĝui pri delikataj detaloj sur la literatura podio. La enhavo atente sekvas opiniojn de ordinaraj civitanoj. Tial ankaŭ komencantoj facile sukcesas kunveturi.

Kniivilä varme dankas *Ulrich Becker* ĉe Mondial pro fulmrapida sed zorga eldonpretigo de la libro. Por mi estas plezuro fieri pro la bela kaj luksa ekstera aspekto de la eldonaĵo. Neniel legantoj devas honti pro troa modesteco rilate al la kovrilpaĝoj. La teksto estas zorgeme kompostita kaj miaj okuloj ne trovis preserarojn. Estas tempo por substreki argumentitan kontenton.

La intervjua metodo tre taŭgas por dokumentkaraktera libro. Pere de spertoj el la ĉiutaga vivo oni ricevas buntan, multkoloran bildon pri realaj situacioj. Tiele trafe sentiĝas tiklaj diferencoj inter homaj opinioj. Facile lokaj loĝantoj rimarkas celkonsciajn mensogojn de gvidantaj politikistoj. Ni ricevis taŭgan kaj facile uzeblan referenclibron pri rusiaj aferoj kaj temoj. Sukcese oni enkondukas nin en la vivon kaj pensmanieron de la malmulte konata rusia stratpopolo.

Tute certe legontoj trovos en la verko surprizajn detalojn. Ekzistas pri rusia politiko, historio kaj kulturo gravaj verkoj, kelkfoje malfacile digesteblaj. Oni ne flugas trans la nubojn ĉe la legado de *Krimeo estas nia*, tute kontraŭe la piedoj restas firme sur la tero. Ege ofte diversaj novaĵoj pri Ukrainio plenigas nian mondon. Kniivilä kapablas konkrete kaj palpeble prezenti komplikajn aferojn kaj okazintaĵojn. Necesas simple konfesi, ke la raporto ”Krimeo” kun la subtitolo ”Reveno de la imperio” lumigas klare ofte iom ombre kuŝantajn faktojn. Ĉiuj konas la eldiron: ”Nenio nova sub la suno.” Rusio dum jarcentoj iris sian propran vojon, kiun ĝi daŭrigas ankaŭ hodiaŭ. Dum miaj urbocentraj kafejaj vagadoj la triopo ”Krimeo estas nia”, ”Krim tillhör oss” kaj ”Krim on meidän” akompanas min en la teko por komparaj lingvaj studoj.

Ni ligas la librotitolon ”Arto labori kune” al Humphrey Tonkin. Ŝajnas al mi, ke Kalle Kniivilä apartenas al simila grupo. Tre multnombra estas lia kunlaborantaro. En la dankesprima ĉapitro ni trovas liston pri helpantoj kaj subtenantoj. Por mi okulfrapas la nomoj *István Ertl*, la edzino *Maria Sandelin* kaj la filino *Alva Kniivilä*. Humile Kalle dankas ilin kaj multajn aliajn pro signifa kaj valora kunlaboro harmonia. Jen mi sincere gratulas al Kalle mem en Skanio kaj vokas ĉiujn legi vere unikan libron.

Fine sekvu eta leĝera aldono pri la tri komunaj lingvoj de la familio Kniivilä. Maria kaj Kalle ekkonis unu la alian pere de Esperanto. La patro parolis al la infanoj finne kaj la patrino svede. Komence Esperanto estis la ”sekreta” geedza komunikilo, kiun scivolemaj infanoj facile konkeris ankaŭ por si propraincitiate. Al la demando de ĵurnalisto pri eventualaj miksiĝoj sur la lingva tereno Kalle diris: ”Ĉio funkcias glate, ni ne rimarkas eĉ, kiun lingvon ni uzas.”

*Jorma Ahomäki*

# Jam pli ol 2 000 aliĝis al la 100-a UK

La statistiko de la jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Lillo (25-a julio – 1-a aŭgusto 2015) eniris la trian milon la 11-an de marto, kiam estis asignita la kongresa numero 2003. Laŭ la nombro de aliĝintoj la 100-a UK troviĝas jam sur la 32-a loko inter ĉiuj UK-oj. Ĉar restas ankoraŭ pli ol tri monatoj ĝis ĝia komenco, ĝi sendube grimpos ankoraŭ multe pli supren en la historia statistiko. Post la 91-a UK en Florenco (2006) tiu en Lillo estos la unua kun pli ol 2 000 partoprenantoj.

Kun 549 aliĝintoj Francio, kiu ofte liveras plej multe da kongresanoj eĉ kiam la UK okazas alilande, suverene okupas la unuan lokon. Kun pli ol 100 aliĝintoj sekvas Germanio (153) kaj Japanio (130), dum tiun limon preskaŭ atingis Pollando (92). Aliaj landoj kun pli ol 25 aliĝintoj estas Belgio (81), Brazilo (77), Nederlando (68), Italio (60), Korea Resp. (50), Hispanio (45), Britio, Ĉeĥio kaj Ĉinio (po 43), Danio (38), Svislando kaj Usono (po 37), Hungario (35), Finnlando (33), Rusio (30), Litovio (29) kaj Svedio (28). Entute la kongresanaro reprezentas jam 70 landojn.

*el GK 573*

# Finna-Sveda-Esperanta Eventeto en Hämeenlinna

La aktivaj ”Esperanto-knabinoj” en *Hämeenlinna* bonvole prezentis sian urbon kaj sin mem al sveda vizitanto 30.3.2015. Vetero sufiĉe malagrabla por vidi la belan Aulanko-parkon, kie maje bluaj anemonoj kovros la deklivojn kaj ĉiuspecaj folioarboj ekverdiĝos. La belvedera turo estis ankoraŭ ŝlosita, sed de sur ties alirebla balkono oni vidis lagon kovritan de glacio kaj neĝo, solenajn malnovajn pinojn kaj pli kaj pli grizajn altaĵojn unuj malantaŭ la aliaj sub forta neĝovento. En la parko ”floris” aveloarbedoj.

La gvidantino, *Marjatta Niemi*, rondveturigis la finna-svedan kvaropon ankaŭ tra la urbo kaj rakontis pri *Sibelius* (150-a datreveno!), la arkitekturo, la diversaj kvartaloj kaj statuoj. En la fino la Esperanto-turistoj eniris ŝian hejmon, kie atendis la agrabla varmo de la hejtigita kaheloforno kaj hejme bakitaj frandaĵoj salaj kaj dolĉaj kun forta kafo. Tamen ne nur la korpojn la dommastrino nutris sed rakontis interesaĵojn pri la varia libraro de la domego. Oni multon lernis. Dankon al la organizintoj!



**Hejme en Hämeenlinna: Eila Dahlman, Kerstin Rohdin, Marjatta Niemi, kaheloforno; fotis Saliko**

*Saliko*

# La 42-a Malferma Tago kun la estraro de UEA

La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas por la 42-a fojo al la Malferma Tago, ĉi-foje kune kun la Estraro de UEA, kiu kunsidos en Roterdamo en la sama semajnfino. La Malferma Tago okazos sabaton, la 25-an de aprilo.

En la 42-a Malferma Tago oni aŭdos prelegojn de prezidanto *Mark Fettes* kaj de aliaj estraranoj. La temoj de la prelegoj estos anoncitaj pli proksime al la aranĝo. La tago kulminos en la lasta programero, ”La Estraro de UEA respondas”, dum kiu la publiko havos la okazon demandi kaj fari komentojn kaj proponojn pri ĉiuj aspektoj de la agado de UEA. Kiel kutime, en la programo estos ankaŭ prezentado de libroservaj novaĵoj kaj de filmoj.

Aldone al specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazaro de esperantaĵoj kaj gajni premiojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

*El GK 569 de UEA*

# Esperanto-societo en Turku

En junio ni vizitos kune kun la someraj kursanoj en la urbaj muzeoj kaj piediras ĉe la riverbordoj. Niaj esperantlingvaj ĉiĉeronoj gvidas vin. Aliĝu al la kurso en Aurala eĉ por mallonga vizito. Vidu la vidindaĵojn en la reta broŝuro sur la paĝo *www.visitturku.fi*

Renkontiĝoj merkrede en la biblioteka kafejo okazos pli-malpli regule. Gastoj estas ĉiam bonvenaj. Informiĝu ĉe EST-anoj pri datoj, kontaktuloj: sekretario de EST *Leena Tiusanen* (*leena.tiusanen@elisanet.fi*, tel. 050-5757956) aŭ la prezidanto *Tiina Oittinen* (*tiina.oittinen@pp.inet.fi*, tel. 050-5494709). Niajn retpaĝojn vi trovos tra *www esperanto fi*.

*Kesäkuun alussa tutustumme kaupungin nähtävyyksiin yhdessä kesäkurssilaisten kanssa. Tule mukaan kurssille edes vähäksi aikaa ja osallistu retkille. Kaupungin kohteista ja muustakin saat tietoa esperantoksi nettiesitteestä, joka on www.visitturku.fi sivulla.*

*Tapaamme keskiviikkoisin enemmän tai vähemmän säännöllisesti kirjaston kahvilassa. Vierailijat tervetulleita, varmista kuitenkin aika ja paikka! Lisätietoja antavat sihteeri Leena Tiusanen (leena.tiusanen@elisanet.fi, puh. 050-5757956) tai puheenjohtaja Tiina Oittinen (tiina.oittinen@pp.inet.fi, puh. 050-5494709)* Nettisivumme löydät liiton sivun *www.esperanto.fi* kautta.

# La stokejo de EAF havas alian lokon

En la komenco de marto la estraro de EAF ricevis bedaŭrindan informon, ke la urbo Pori nuligas la lukontrakton de nia stokejo: ni trovu alian ejon por niaj Kalevalaoj ĝis la fino de majo, kiam oni ekmalkonstruos la nunan stokejon.

Dank' al nia prezidanto troviĝis ebleco sublui angulon en la sidejo de la Maldekstra Alianco en Rauma. Nia lupago por la nova stokejo estos eĉ pli favora ol en Pori estis.

La transporto de la libroj estis farita sabate la 21-an de marto per la aŭtomobilo de Tuomo kaj senpage pruntita tirvagono. Volontule laboris la subskribinto, Robert kaj Tuomo. Momente helpis ankaŭ mia frato Pekka.

*Paula Niinikorpi*

# Memoroj kaj impresoj pri la Vintraj Tagoj en Tampereo

Estis ĝojige renkonti kvardekon da gesamideanoj kaj iom konatiĝi pere de interesa kaj instrua prelego kun t.n. ”lingua franca”-lingvoj.

Samtempe tamen estis malgajige pensi pri la tempopaso, la jaroj kiuj pasis post la tamperea UK en 1995. Dudek jarojn! En la vivo de ĉiu samideano okazis ŝanĝoj kaj perdoj, ĉu ankaŭ gajnoj?

Por mi persone gravis la vizitoj al la ortodoksa preĝejo kaj al la ekspozicio pri mezepoka pilgrimado en la Muzeo Vapriikki, antaŭe fabriko Tampella. En la preĝejo plej afable disponigis al ni siajn sciojn *Jukka Laaksonen*. Ni povis ankaŭ atenti, kiel kondutas la paroĥanoj vizitantaj la preĝejon. La paroĥanaro estas internacia, multaj enmigrintoj el diversaj anguloj de la mondo trovis sian vojon al tiu preĝejo konstruita en 1896–1899 laŭ planoj de la inĝeniera kolonelo *T. U. Jazykov*. Kiel bone, ke ili povis trovi ion konatan, trankviligan, en la ortodoksa preĝejo de Tampere. Jam antaŭ la alta ekstera ŝtuparo ili faris krucosignojn.

En Vapriikki oni povis elekti ekspoziciojn laŭ sia gusto: pri poŝto, pri naturscienco, pri pilgrimado, pri modaj vestaĵoj…. Ne sufiĉis la tempo por ĉio. Mi elektis la pilgrimo-ekspozicion. Multon ĝi malkaŝis pri la superstiĉoj de niaj prauloj, pri iliaj pli malpli piaj deziroj, komercado, suferoj kaj espero pri kuraciĝo.

La programo de VT estis vere riĉa kaj atentokapta, aldone al la neeviteblaj jarkunsidoj.

*Mallonge notis*
*Saliko*



**Jukka sonorigas, fotis Saliko**




**Anonco de la prelego, fotis RB**

# Rekordon centjaraĝe: Ŝi naĝis 1 500 metrojn

Saluton, karaj geamikoj!

La artikolo sube estis publikigita en brazila ĵurnalo. La esperantisto Josenilton el Brazilo esperantigis ĝin. Legu pri la sporta mirindaĵo farita de la japanino *Mieko Nagaoka*.

*Liette Lêla pere de Saliko*


Foto: AFP

Dum ni sonĝas alveni al la centa jaraĝo almenaŭ paŝante, unu centjara praavino konkeris ion historian en la sporto. La japanino Mieko Nagaoka estas la unua centjara virino, kiu sukcesis kompletigi konkurson de 1 500 metroj pri libera naĝado en duonolimpia naĝejo je 25 metroj. Ŝi faris tiun mirindaĵon en unu horo kaj kvarono, per dorsa naĝo.

Nagaoka estis la sola homo kun tiu aĝo – en la kategorio de 100 ĝis 104 jaroj – kiu partoprenis tiun konkurson en la malgranda urbo Matsujamo, la lastan sabaton.

Kaj ĉu vi pensas, ke ŝi trejnis la tutan vivon? Ne! Nagaoka, kiu komencis naĝi nur kiam ŝi estis 80-jaraĝa, ankaŭ posedas la rekordon en sia kategorio pro tio, ke ŝi naĝis saman distancon en 50-metra olimpia naĝejo. La japana naĝistino ankaŭ konservas la mondan rekordon en sia kategorio laŭ rekono de IFN (Internacia Federacio pri Naĝado), kun 24 premioj pri mallongaj kaj longaj distancoj.

Nun ŝi esperas, ke ŝia lasta atingaĵo estos rekonita de la Guiness-libro pri rekordoj.

Gratulon, sinjorino Nagaoka!

# Esperantohelsinki rekomendas

Jen kelkaj esperanto-eventoj ĉi-printempe por riĉigi vian vivon kaj lingvoscion. Elektu laŭ via gusto.

Nia aprila klubvespero, en la oficejo 21.4. je la 17a horo. Programo anoncota.

*Esperanton kesäkurssi Turussa* 4.–7.6. *Lisätietoja* /pliaj informoj en Esperantolehti *ja täältä* (*www.esperanto.fi* ).

Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-51) 25.–28.6. en *Tallinn*, Estonio. Ĝis nun la plej ampleksaj informoj pri tio troviĝas en la retejo de Litova Esperanto-Asocio (*www.esperanto.lt/board/view.php?id=arangxoj&no=81* ).

La tradicia printempa ekskurso okazos komence de junio, laŭplane sabaton 13.6. Ni vizitos la novan naturcentron *Haltia* en *Espoo*. Legu pli pri ĝi en la finna ĉe *Suomen luontokeskus Haltia* (*www.luontoon.fi/haltia* ).

Universala Kongreso de Esperanto (*www.uea.org/kongresoj*, UK) 25.7.–1.8. en Lillo (Lille), Francio.

Itala Kongreso de Esperanto (*kongreso.esperanto.it/82/?lang=eo*) 22.–29.8.2015 en *San Benedetto del Tronto*, apud la Adria maro.

# Paiva Netto: ”Meditadoj el la Animo”

**Tute neatendite** ekestis al mi nova kontakto kun Brazilo. La Esperanto-fako de la Legio de Bona Volo en San Paŭlo sendis al mi la libron ”Meditadoj el la Animo”. Kompreneble mi volonte kaptis la proponitan taskon skribi recenzon pri la ricevita verko, kiu helpos nin kompreni nian propran spiritan naturon kaj percepti nian lokon en tiu ĉi mondo, kiun ni deziras pli bona kaj pli solidara por ĉiuj homoj.

**La unua eldono** de la libro aperis en la jaro 2003 portugale kaj oni vendis ĝin ĝis nun en 400 000 ekzempleroj. La esperantlingvan version oni publikigis en la jaro 2011. La ekstera aspekto forte karesas la okulojn de legantoj. Multaj artverkoj ornamas ĝiajn paĝojn tre bele. Por mi tamen la plej valora signifo en la libro estas ĝia teksto, la vorta enhavo. Ofte mi aŭdis la esprimon ekumenismo. Nur nun en la verko de *Paiva Netto* mi ricevis tre klaran kaj kompreneblan bildon pri ĝia signifo. Antaŭe mi rigardis la menciitan koncepton el mallarĝa kaj limigita vidpunkto.

***Meditadoj el la Animo*** kunportis lumradiojn en mian cerban maŝinaron tiel, ke mi trankviliĝis kaj kapablis akcepti valorajn instruojn por mia vivitinero. Tutmonde konataj ĉiĉeronoj portis torĉon antaŭ mi kaj estis tre facile pilgrimi kun ili. Espereble mi sukcesos ion esencan koncerne la menciitan libron transdoni kaj peri al la legantoj de tiuj ĉi linioj.

**Komence gvidadon** en la libro prenis ”Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro”, kiu tute simple diris: ”Vi amu unu la alian kiel Mi amas vin.” Paiva Netto akcentas, ke Paco, la vera Paco naskiĝas unue en la pura koro de Homo. Kaj nur Jesuo povas purigi la koron de la Homaro je ĉia malamo, ĉar Jesuo estas la Sinjoro de Paco. La aŭtoro daŭrigas kaj prezentas tutan faskon de tutmonde konataj pensuloj. Tre alloge ruliĝas la rakontado de Paiva Netto.

**Indas mencii** kelkajn gravajn nomojn. *Abraham Lincoln* (1809–1865) fariĝis la 16-a prezidento de Usono. Li skribis: ”Kiam mi agas per Bono, mi sentas min bone; kiam mi agas malbone, mi sentas min malbone. Jen mia religio.” Nu, neniu povus nomi lin senreligiulo. ”Vero estas en ni. Ĝi ne aperas el eksteraj aferoj, eĉ se ni tion kredas. Ekzistas ia interna centro, kie loĝas vero en sia pleneco”, predikis Budho (556–486 a.K.).

**Specialan stampon** al la esprimado de Paiva Netto donas la prezentitaj homoj, gravaj pensuloj el la pasintaj jarcentoj kaj el la hodiaŭo. Eblas mencii nur kelkajn nomojn, ekzemple Sokrato, Konfuceo, Johano Paŭlo la II-a, *Muhammad*, Sankta Aŭgusteno, *Winston Churchill*, Marteno Lutero, Francisko el Asizo, *Gandhi* kaj Lazaro Ludoviko Zamenhof. La longega nomlisto estas bunta kaj varia. Ĝuste tio inspiras kaj vokas por legi kun scivolema kaj varma koro, kiun profunda entuziasmo gvidas.

**Brazilo estas lulilo** de espero pri ia socio, en kiu malgraŭ ĉiaj ĉagrenoj eblos vivi en Paco kun si mem kaj kun la Proksimulo. La profeto Muhammad instruis, ke plej forta estas tiu, kiu scipovas regi sin mem en momento de kolero. Preĝado estas nepre necesa por sekureco kaj feliĉo de Homoj. Ĉiu homo povas preĝi la Patronian. Ĝi ne limiĝas al aparta kredo. Temas pri universala preĝo, laŭ la vasta Spirito de la Ekumena Kristo. Ĉiu homo, eĉ ateisto (kial ne ?!) povas eldiri siajn parolojn libere. Tiel gvidas nin Paiva Netto, la ĉefo de la *Legio de Bona Volo*.

**En la jaro 1989** starigitan Templon de Bona Volo vizitis ĝis nun en Brazilo pli ol 24 milionoj

da pilgrimantoj. Estas necese ankoraŭ substreki, ke vere indas legi kaj trastudi la verkon ”Meditadoj el la Animo”, kies lumiga fajro gvidas nin al la celo.

”Patro nia, kiu estas en la Ĉielo, sanktigata
estu Via Nomo.
Venu al ni Via Regno, plenumiĝu Via Volo,
tiel sur la Tero, kiel en la Ĉielo.
Nian ĉiutagan panon donu al ni hodiaŭ.
Pardonu niajn ŝuldojn,
kiel ni ankaŭ pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono,
ĉar via estas la Regno, kaj la Povo
kaj la Gloro, por eterne, Amen!”

*Jorma Ahomäki 2015*

# El la finna E-historio: Esperanta Finnlando (n-ro 12/1921)

**La Finnlanda parlamento daŭre subtenas Esperanton.**

En sia plenkunsido la Finnlanda parlamento pritraktante la budĝeton alvenis al ĉapitro XIII: subteno por scienco kaj arto. En la registara propono tie troviĝis i.a. subvencio de 25 000 Fmk por Esperanto-Asocio de Finnlando. Krom tio estis samtempe pritraktendaj du parlamentaj proponoj de *Soininen* kaj 3 aliaj pri subteno de la Esperanta movado per 75 000 mk, kaj alia de parlamentanoj *Eklund* kaj *Hildén* pri subteno de Ido per 25 000 mk. La civilizacia komisiono, kiu unue esploris la demandon, per plimulto proponis, ke la parlamento donu 35 000 markojn, dividotajn inter esperantistoj kaj idistoj, laŭ la amplekso de la movadoj. La financa komisiono, kiu sur la fundamento de la registara propono kaj de la raportoj de la diversaj komisionoj preparas la proponon por definitiva budĝeto, estis samopinia kun la registaro, proponante la 25 000 markan subvencion sole al la Esperanta movado.

Tiel preparite la demando venis antaŭ la parlamenton la 2an de decembro. Ĉi tiun fojon la esperantistoj sufiĉe frue antaŭe sciis pri la okazo, kaj deko da samideanoj sidis sur la galerio aŭskultante la interesan diskuton. (Sekvas raporto pri la diskuto.)

La propono de la registaro estas aprobita, kaj E.A.F. ricevis por 1922 la subvencion de 25,000 mk.

Apenaŭ estas necese akcenti la gravecon de tiu decido. Certe la donita subvencio ne estas tre granda, kaj ankaŭ ne pli granda ol la sumo ricevita por ĉi tiu jaro. Sed la propono pri plialtigo de la subvencio estis rifuzata ĉefe pro la ĝenerala ŝparemo, kiu ludis ĉefan rolon en la pretigado de la nuna budĝeto. Kaj estas grave-ge, ke per ĉi tiu decido la ŝtata subvencio al Esperanto estas kvazaŭ konsolidita. Kaj ankoraŭ pli grave estas noti, ke en ĉi tiu jaro neniu parlamentano proponis rifuzon de la tuta subvencio, la diskuto estis serioza, kaj tiuj voĉoj, kiuj pledis por duonigo de la sumo, ne venis el aŭtoritata flanko. La ĉefaj pledantoj por Esperanto, kontraŭe, estis plej aŭtoritataj, kiel oni povas vidi el supra raporto. (La raporto ĉi tie mankas.) Kiel skribis la Helsingforsa ”Iltalehti”, ĝis nun nia plej sistema kontraŭulo, la diskuto estis granda morala venko al Esperanto.

*Vilho Setälä*

# Du festaj memorlibroj por Helmar Frank kaj por Humphrey Tonkin

La finna poeto *Koskenniemi* asertis, ke ni estos ĝis la tombo lernantoj. Tion mi forte sentis ĉe miaj fingropintoj dum la ĵus nun kuranta velksezono en mia vivo. Feliĉe mi trovis du efikajn plivigligajn pilolojn, jen mi aludas al du gravaj verkoj ”Littera scripta manet” kaj ”La arto labori kune”. Ili estas ambaŭ briksimilaj gigantoj. La unue menciita havas entute pli ol 700 paĝojn kaj la dua 900 paĝojn.

*Petro Chrdle* en Prago rekomendis al mi en la jaro 2013 eldonitan festlibron honore al la okdek-jariĝo de prof. *Helmar Frank*. En la jaro 1975 prof. *Humphrey Tonkin* prelegis en la Universitato de Turku. La paroladon lian mi interpretis en la finnan lingvon. Estis tute nature, ke mi en la jaro 2010 havigis al mia hejma biblioteko la festlibron de prof. Tonkin.

La menciita 1600-paĝa ĝemela pakaĵo estas ne-elĉerpebla fonto pri notindaj eroj por ordinaraj esperantistoj. En mia junaĝo mi havis tre utilan referenclibron ”Eta Gigantulo”. Hodiaŭ en mia veterana vivofazo mi nun posedas kaj legadas du similajn utiligindajn perlojn, kiuj facile trankviligas min ĉe avida legado.

Entute 57 fakuloj skribis por la Helmar Frank-libro eseojn ĉefe pri lingvistikaj temoj. La artikoloj aperas dulingve, en la pensadlingvo de la aŭtoroj kaj paralele en Esperanto. Tiu maniero estas utila. Esperantistoj povas legi tekstojn de diversnaciaj specialistoj kaj krome ne-esperantistoj povas konvinkiĝi, ke en Esperanto eblas verki ankaŭ sciencajn tekstojn.

Kompreneble ĉiuj skribaĵoj estas notindaj kaj gravaj. Al mi eblas ĉi tie mencii nur unu eron. *Norman Berdichevsky*, denaska Novjorkano nune loĝanta en Florido, skribis pri ”125 jaroj de Esperanto – kial kaj kiel ĝi estas diversa”. La babelturo staras nun pli firme ol iam ajn, diras Berdichevsky. ”La plej multaj registaroj, se ili havus intereson pri forigo de lingva barilo estintus jam delonge farintaj ion seriozan por tio.”

La festlibro de Tonkin prezentas komence dialogon inter Humphrey Tonkin kaj *Mark Fettes* realigitan en februaro 2005 survoje inter Montrealo kaj Novjorko. Tre bele oni esprimas, ke Esperanto donis novan vivon al prof. Tonkin ekde la junulara kongreso 1958 en Germanio. Kuraĝe mi antaŭvidas, ke vi trovos sur la paĝoj de tiu ĉi dikega referenclibro multajn interesajn faktojn. Jam kvar jarojn mi legadas ĝin kaj daŭre ekaperas al mi nekonataj informoj kaj faktoj.

Inter proksimume 100 kontribuantoj estas du ankaŭ el Finnlando. Ili estas prof. d-ro *Jouko Lindstedt* kaj d-ro *Jukka Pietiläinen*. La unue menciita estas profesoro pri slava filologio en la Universitato de Helsinki. Pietiläinen estas esplordoktoro en Aleksander-Instituto en la ĉefurbo de Finnlando. La temo de Lindstedt estas tre tikla: ”Lingvo – rimedo aŭ resurso?” Pietiläinen skribis sub la titolo ”Plurlingvismo kaj Esperanto”.

Ambaŭ verkoj ne estas dormigiloj sed tute kontraŭe. Ili semas entuziasmon kaj forton por studi multflanke la lingvon kaj la movadon. Ne cerbumu heziteme, sed ekagu tuj celkonscie.

*Jorma Ahomäki*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti *eafgazeto@esperanto.fi*.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 *www.esperanto.fi/helsinki jukka.pietilainen@he*lsinki.fi(Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 💻 *onni.kauppinen@pp.inet.fi*
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202 💻 *kimmo.hannula@creavit.fi*, *www.esperanto.fi/jyvaskyla*
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala 💻 *www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com*
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Carola Antskog) Hedbergsvägen 3 B, 25700 Kimito 💻 *cantskog@kolumbus.fi*
- Esperantoseura Antaŭen r.y. / Esperanto-societo Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere 💻 *ww.esperanto.fi/tampere (*Markus Sunela*: markus.sunela@iki.fi* ☎ 040 7685 165)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 *tiina.oittinen@pp.inet.fi* ☎ 050 549 4709
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. 💻 *sylvia.h@kolumbus.fi* ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 🖷 (09) 660 651 💻 *steleto@pp.inet.fi*
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 *fejo@esperanto.fi*. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 EUR tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 EUR sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 EUR. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). 💻 *esperarto@phnet.fi*.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro 2015**

| Nro | Limdato | Aperas |
|---|---|---|
| 3/2015 | 31.5. | en junio |
| 4/2015 | 1.9. | en septembro |
| 5/2015 | 15.11. | en decembro |

### Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 EUR | 1/1 sivu/paĝo 50 EUR |
| 1/2 sivua/paĝo 60 EUR | 1/2 sivua/paĝo 30 EUR |
| 1/4 sivua/paĝo 40 EUR | 1/4 sivua/paĝo 20 EUR |

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: *eafgazeto@esperanto.fi* aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

BA2
Itella Posti Oy

Itella Green




## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuussa. Aineisto 31.5.2015 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en junio. Artikoloj ĝis 31.5.2015 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <*eafgazeto@esperanto.fi*>.

Kopio Niini, Tampere 2015